



# Pos-Amiko

IJK 2022, merkredo, numero 46

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## Pos-Amiko nun aperadas pli ofte ol Kontakto

Kaj ĝi certe estas pli amuza kaj pli aktuala!

## Partoprenantoj strikas!

Iam devis esti sufiĉe. Post kvar tagoj da sufero hodiaŭ la partoprenantoj de la IJK decidis organizi strikon, por plendi kontraŭ la malbona manĝo, la mankanta informado, kaj la tre ĝenantaj vespoj ĉie. La grupo da strikantoj unue malplenigis la manĝejon, forprenante amason da pano, fruktoj kaj salatoj, kaj poste malaperis en busoj.

En la kongresejo nun restas nur organizantoj, helpantoj kaj homoj tro pigraj por iri ien. La helpantoj pro la striko timas, ke ili finos siajn deĵorojn tiom frue, ke restos tempo antaŭ la komenco de la sekva deĵoro, kaj ili subite devos mem elpensi kion fari. La organizantoj aliflanke aprezas la strikon, ĉar nun ili finfine povas trankvile komputilumi en la akceptejo sen vizitoj de ĝenaj partoprenantoj kun demandoj pri ĉio ajn. Kaj la ceteraj partoprenantoj ankoraŭ dormas en siaj tendoj.

Laŭ ĵurnalisma esploro de tiu ĉi gazeto la striko-partoprenantoj planas organizi protest-marŝojn en grandaj urboj por doni videblecon al la problemaro. Multaj el ili kunportas flagojn, vestaĵojn aŭ markojn en verda koloro, kiu simboligas la vomemon pro la manĝoj.

Proparolanto de la striko anoncis en buso al Amsterdamo la postulojn de la strikantoj: "HOMOJ! JAM TEMP' ESTÀ POR PLI BONA MANĜO, KAJ PLI BONA ORGANIZADO. KAJ MORTON AL VESPOJ!" Se la organiza teamo de la IJK ne aŭskultas la postulojn, la strik-partoprenantoj minacas striki denove je sabato.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Se vi ne volas pagi por boato, faru la kanalan ekskurson naĝe.

**Taŭro:** Vi malkovras, ke pli facile solveblas kvizo ol krizo.

**Ĝemeloj:** Atentu, estas malpermesite en la klubdomo de Verda Stelo krei novan klubon.

**Kankro:** Diru saluton al ĉiuj homoj surstrate en Amsterdamo kiel socia eksperimento.

**Leono:** Aŭgusto estos bona monato por venki en kvizo.

**Virgulino:** Post montrado de libera kulturo vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi eniris la malĝustan buson kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Ne forgesu regule turni vian tendon por baki ĉiujn flankojn egale en la suno.

**Marko:** Ĉu vi tiom ŝatis la retajn IJK-ojn, ke vi nun ankaŭ ĉeestan partoprenas rete?

**Sagitario:** Atentu ne konfuzi vian salaton kun 'liberkulturaj herboj'.

**Kaprikorno:** Vi ne povas maltrafi la buson por la reveno, se vi neniam eliras ĝin.

**Akvisto:** Ĉu vi vere estis en Amsterdamo, se vi tie nek perdis nek ŝtelis biciklon?

**Fiŝoj:** Kial postuli tiom da ŝanĝoj en la IJK, se vi facile povas organizi propran?

## Programo

	<u>Mangejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u>	<u>Filmejo</u>	<u>For</u>
08:00	Matenmanĝo				
09:00					Ekskursoj
10:00		Kurso por			al
11:00		progresantoj			Amsterdamo
12:00	Tagmanĝo				kaj
13:00					Antverpeno
14:00			Kizombo		
15:00	Ludo: Ŝanĝa				
16:00	Horloĝturo				
17:00					
18:00	Vespermanĝo				
19:00					
20:00			Emerson		
21:00			Kvizo		
22:00	Trinkejo	Astrofotado	Eŭrovida diskejo		